

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Guido Holz*

1. La luno nun ekhelas,  
Steletoj oraj belas  
En la ĉiela klar’;  
L’arbaro nigra revas,  
Kaj el herbejo levas  
Mirige sin nebula mar’.

2. Silenta estas mondo  
Kaj en krepuska rondo  
Hejmecas kun favor’!  
Similas kalman ĉelon,  
En kiu vi kverelon  
De l’tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?  
Aspekto nur duonas,  
Sed rondas ĝi en bel’.  
Do ankaŭ estas multo,  
Loganta al insulto,  
Okulojn ĝenas la malhel’.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La luno nun leviĝis,  
La steloj eklumiĝis,  
Subiĝis jam la sun’.  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel  
Hejmeca ĉambro, tiel  
Trankvila estas ĝi.  
Dormante ĉiun penon,  
Aflikton kaj ĉagrenon  
Dum nokta hor’ forgesu vi.<sup>3</sup>

3.) Jen staras ĉe l’ ĉielo  
Tre eta fora stelo,  
Sed tamen egas ĝi!  
Ja estas ofte aĵo  
Por ni nur ridindaĵo;  
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Joachim Gießner*

1. La luno jam leviĝis,  
steletoj ekheliĝis,  
ravante homojn nin.  
Silentas la arbaro  
kaj super la kamparo  
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,  
la mond’ ne plu sin movas  
sub paca, klara lun’.  
Nun petu noktan benon,  
de l’tago la ĉagrenon  
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo  
en brila ronda belo  
duon-videbla nur.<sup>4</sup>  
Ĉar multon ni ne vidas,  
ni ofte ĝin priridas,  
malsaĝe juĝas kun plezur’.

...

<sup>3</sup> alia versio:

2.) Aĥ, kiel trankvileca  
La mondo kaj hejmeca  
Vespere estas ĝi!  
En tiu kalma paco  
Ekdormu vi pro laco,  
Forgesu la aflikton vi!

<sup>4</sup>S-ro Gießner unue tajpis:

4. Ni homoj tiel vantaj Ja estas nur pekantaj, Malvasta nia sci'; Ĥimerojn ni eltrikas, Ni multe artifikas Kaj perdas celon pli kaj pli.	4.) Ni homaj fieruloj, Mizeraj ni pekuloj, Malmulton scias ni! Ni faras multajn aĵojn Kaj artajn elpenaĵojn, Sed vana estas tio ĉi.	4. .... ..... ..... ..... ..... .....
5. Vidigu, Dio, savon, Pasem' ne veku ravon, Ne ĝoju ni pro glor'! Fariĝu malafektaj Ni kaj al vi respektaj, Infane gaju nia kor'!	5.) La Dian savon vidu Ni nur kaj ni ne fidu je vanta iluzi'! Ni malfieraj iĝu, Ni ĝoju kaj piĝu, Infan-egalaj estu ni!	5. .... ..... ..... ..... ..... .....
6. Vi gracu, sen ĉagreni El mondo nin forpreni Al fin' per milda mort'! Kaj post forpren' fidele Hejmigu nin ĉiele, Sinjoro, Dio, nia fort'!	6.) Finfine vi nin prenu El tiu mond', ĉagrenu Ni ne pro tio ĉi! Kaj kiam vi nin prenos, Ho faru, ke ni venos En vian regnon, kara Di'!	6. .... ..... ..... ..... ..... .....
7. Kuŝiĝu do kun pio Vi en la nom' de Dio, Jam fridas nokta vent'. Per punoj, Di', ne ĝenu, Per dolĉa dorm' nin benu, Najbaron ankaŭ en turment'.	7.) Gefratoj, enlitigu, Trankvile endormigu! Noktiĝas ĉie ĉi; Vin gardos nia Dio. Li regas super ĉio. Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!	7. Ĉe l'fino de la tago kuŝigu vin sen plago, silentas la anim'. Ne punu nian faron, sed nin kaj la najbaron dormigu, Dio, nun sem tim'.
...	...	...

---

duona tamen nur.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1989-09-10.*

*MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)*

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en “Esperanto aktuell 6/1984”.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-394-782 (2007-03-28 09:55:34)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua strofo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte, estas hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon de Otto Bonte.*